GISTO, SEP-2004.
VASKE,Georgo Otto
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
otto@caiweb.com.br

ttt-kongrua legajxo senpage disdonata.

Pri la GAUCHA RENKONTIGXO.

Kvankam oni esperis arigi chirkau 200 homojn, inter gesamideanoj kaj "turistoj", vidigis sin almenau dudeko da diligentuloj meze de cento da partoprenantoj. Oni kantis la himnojn nacian, gauchan kaj la internacian. Rimarkeblis ke la tekstoj de la himnoj estas suprajxe sciataj. Flanke de Prof. Nilce, staris viro kiu anoncis la programerojn en lama Esperanto, malforte elparolate. Chu estis neniu pli kapabla volontulo, por tiu posteno? Plachis al mi audi kelkajn frazojn agrable diritajn de nia diligenta Ennio (Torres).

La dua grava ero estis la prezentado de laborplano de la nova BEL-estraro, far nia juna Stoduto. Li, jes parolis fortavoche, en tre bona Esperanto/nacvilingva prezentado. Lau mia komprenkapablo, la teorio pri instruado kontagxas aktivajn gesamiodeanojn. Konsiderendas tamen ke, en kabineto elpensita plano similas al konstruprojekto far arkitekto kiun engxeniero devas plenumi, ofte ne 100% realigeblan. Sed, la arkitekto insistas: plenumu gxin, kostu gxi kiom necese. La kosto strangolas la konstruanton. – Teorio ne kreas realajxon. Sxajnas ke la E-movado elitigxas, ke nur triagradanoj rajtas opinii pri instruado spite al multjara sperto de veteranaj volontuloj. Dubindas chu BEL pagos instruistajn kursojn. La afero memorigas dirajxon de nia forpasinta profesoro Boris Eston: "Esperanto stagnas pro la pretendo ke chiuj estu richuloj. Chu eblas ke instruistoj flugu al kongresoj kie ajn ili okazas chu enlande au en Azio , se al ili mankas ech decaj vestajxoj?"

La antautagmeza programo finigxis per pantomima spektaklo far viro, ino kaj "bebo". Gxi bone impresis, estis laudinda kaj aplaudinda kvankam ties Esperanto lamas. Pluraj vortoj estis miselektitaj krom ke sxi diradis NO=ne. Chu ili ne trovis helpemulon kiu bonvolis gxustigi la vortojn? Pro etetaj malglatajxoj tuta entrepreno povas sinki, ofte pro la fiero konsideri sin memsuficha. Ke tio ne okazu dum la preparlaboroj por la 40ª BKE! Oni ne neglektu memkritikojn; kritikoj (kasxaj) far aliuloj kauzas stagnadon pro la fakto ke, kiu pagas aligxon, tiu abomenas laman Esperanton au, ...despli, krokodiladojn.

Domagxe ensxteligxis prokrastoj kaj la anoncita debato pri la priparolita temo, LABORPLANO, ne okazis.

MEMORU: trinkakvo en la mondo ekzistas nur 1%. Do ni ĉi ZORGU!

PAROLIGAJ KUNSIDOJ

Kun la celo kauzi bonan impreson al niaj gastoj, dum la 40ª BKE en Porto Alegre, mi petas permeson ree insisti ke GEA tuj tuj starigu, krom la laborplanon de la LKK, intensivajn paroligajn kunsidojn, unu au prefere du fojojn en la semajno. Manke de pli rekomendinda metodo, mi sugestas ke chiu vochlegu teksteron el elektita, facile komprenebla rakontaro. Sekvu chiam demonstro pri chies komprenkapablo de la legita tekstero. Ofte okazu redaktado de simplaj mesagxoj pri chiutagajxoj. La lernadon devas gvidi unu el la bonaj parolkapabluloj de POA. Mi sufiche konas ne chiujn krom la kompanojn de la Verda Kafo. Lau mi, devos kandidatigxi prof. Cezar, la geZaghettoj, Stoduto. Ili kutimas paroli fortavoche, necesa por faciligi la lernadon.

Nepra kondicho: chiu parkere sciu la kvar "angulsxtonojn": la korelativajn vortojn, chefajn prepoziciojn, la verbojn en chiuj Modoj, chu transitivaj au ne.

Devas facile distingui inter subjekto kaj rekta objekto en la frazo. Chi kondicho estas neforigebla por atingi fluan parol- kaj komprenkapablon. Chu laboriga tasko? Jes, tamen plezurdona entrepreno, por ke la gaucha movado estu simpatie memorigata, post la Kongreso, tra la tuta lando

Grava fakto estas memorigenda: mankas malpli ol unu jaro, karaj geamikoj! Ek al!!

>>>>>>>Iom da bonhumoro, por malpezigi la zorgojn en la pensejo, pro la proksimigxo de 2005, verde farchita de kompromisoj kaj responsoj.

MODERNA SOCIO

Patrino enua pro serio da komplikaj amindumoj de sxia filino...

- Nu, kian tipon de viro vi nun arangxis ?

- Trankviligxu, panjo. Nun mi trovis veran ekzemplon. Li estas religiema, laborema, ne drinkachas kaj ne fumas, havas kvar filojn kaj kompreneman edzinon. – Noto de la tajpinto – Post tri generacioj neniu plu scios kiu estas parenco de kiu, diris notário, pro komplikaj fusxajxoj okazantaj en nia lando... Haj...haj...haj.

RELIGIA LECIONO.

La instruistino alparolas la etan Jocjon kaj petas:

- Knabo, citu chion farendan, por eniri la Chielon.

La knabo ech ne palpebrumas, antau ol respondi: "Sufichas morti".

NULVALORA

Edzino deklaras sin pli inteligenta, pli valora ol la edzo:

- Mia "QI" estas multe pli alta ol la via. Mia averagxa poentaro en la Universitato estis pli alta ol la via!

- Jes, bone sed, se ni observas la situacion el alia starpunkto pli vasta, mi ankorau superas vin.

- Kiamaniere do? – Mi elektis bonan virinon, por vivteni min sed vi edzinigxis al sentaugulo.

RIMARKO – Gisto-pretigado kaj distribuado (al foraj kompanoj) kostas tempon,"fosforon" kaj posxtajn elspezojn. Kiu ne plu volas ricevi gxin, BV manifestigxi. Antaudankon!